


# Aŭstraliaj



# Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

### RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KAJ NOVZELANDO

<http://itranslate4.eu/>

PLENUMITA 29/10/2015 Ducenttrideknaŭunua eldono 29/10/2015 SENDITA (unua eldono 20/09/2011)

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);



**Redaktoro Roger Springer** Provlegita de Franciska Toubale

SENDATA AL 315

La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj



## El Ĉinujo 中国武汉 Roĝer vizitas Ĉinujon ĝis 29-Novembro -2015



Sendu respondojn novaĵon (eĉ mallongan), bildojn, fotojn al mi [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

Mi pardon petas. Kelkaj informis ke la elsendo de AE240 fuŝis iomete.

Ĉar mi ne havas la eblecon de Ĉinujo scii kiuj ĝin ricevis aŭ ne, ĉi foje mi sendas AE 240 kaj 241, Ankaŭ mi avizas la nericevintojn iri al la AEA retpaĝo por kopioj, ĉar ĉiuj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ atingebblas je tiu adreso.

(crl+klaku la veran ligilon) <http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo>



Estas pli ol **166,000** lernantoj en la Esperanto-kurso de Duolingo.

<https://www.duolingo.com/> (la Esperanto-kurso de Duolingo el de la 28a de Majo 2015)

## 94. LA GRAMATIKO DE ESPERANTO

### Prepozicio aŭ Akuzativo? D. Postskribo 1.

Zamenhof decidis ankaŭ, ke oni povas transitivigi netransitivan verbon, simple ŝanĝante iun ajn prepozitivan en la akuzativon, nomante tiun akuzativon (Rekta) Objekto kaj do nomante la verbon transitiva. Pro tio ni teorie povus ankaŭ



(retro)ŝanĝi ĉiun objekton akuzativon en prepozitivan objekton, ekz. "Li amas mian fratino" al "Li amas je mia fratino". Oni ankoraŭ ne faras tion, ĉar uzi objekton akuzativon estas pli klara, ekz. "Li dormis la dancadon" povus signifi la intencitan "Li dormis pri la dancado" kaj la kutiman "Li dormis dum la dancado". Do kelkfoje teoriaj ebloj en lingvo, inkl. Esperanton, ne eblas praktike, pro naturaj kaŭzoj aŭ reguloj. Ekz. "I dreamt this beautiful night" povas signifi objekte "about this beautiful night" kaj prepozicie "during this beautiful night".

Marcel Leereveld.

## Novaĵoj pri la Esperanto-Doma Gastdormejo



★ La Esperanto-Domo de EFNSK havas nur unu gastdormejon. Ĝi havas 2 dupersonajn litojn kaj 2 unupersonajn litojn en la ĉambro. 4 ĝis 6 esperantistoj povas resti tie samtempe. Ĉar, sed malofte, vi ne estos la sola gasto en la dormejo. Ni devas scii, ĉu vi estas viro aŭ virino por ke vi ne estu kun nekonata persono de la alia sekso sen via konsento.

★

Esperantistoj sendu ĉiujn petojn por resti en la gastdormejo al la Sekretario de la Esperanto Federacio de NSW retmesaĝe al [efnsw@tpg.com.au](mailto:efnsw@tpg.com.au) (crl+klaku la veran ligilon)

★

Kam Lee kaj May O'Halloran venos la 29an de Oktobro ĝis la 4a de Novembro.

Lyudmila Kelloway 5a de Novembro ĝis 11a de Novembro

Tomiko Otagiri kaj ŝia frato. Ili deziras restadi de la 21a ĝis la 25a de Novembro

Lyudmila (KELLOWAY) alvenos la 09-an kaj foriros la 15-an de Decembro 2015.

## La [Esperanta Retradio](http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine) donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



<http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine>

Vi bezonas nur 5 minutojn ĉiun tagon por tiu programo. ☺ ★★★



## La Melburna Esperanto-Klubo

kunvenas ĉiujn lundojn, 6.30ptm ĝis 8.30ptm

ĉe Ross House, 247 Flinders Lane.

"La membroj de la Melburna klubo bonvenigis novajn lernantojn pasintan lundon.

Dum la kunveno ni debatis multe pri la avantaĝoj (aŭ ne) de nia lingvo.

Partoprenantoj estis Marcel, Karlo, Ken, Esther, Tristan, James, Heather, Esan kaj Yask."



"ANONCO

La Zamenhofa Festo okazos je 6.30 pm la 12an de Decembro 2015 ĉe la "Melbourne Unitarian Peace Memorial Church, 110 Grey Street, East Melbourne.

Ĉiuj estas bonvenaj."

Heather Heldzingen 19/10/15



## La Manlia Esperanto-Klubo.

Anoj kunvenas la unuan kaj trian Sabaton. 10atm

Bavarian Beer Cafe, Manly Wharf; Unu taso da senpaga kafo

Kvankam brizo blovis el la maro, la suno varmigis Manlion. Je la kafejo. Ian Wylless rakontis san ferion en la Hunter Valo, bone konata regiono de NSW. Tie, li tendumis en la arbusto, malstreciĝis kaj enspiris la freŝan aeron kaj pacema ĉirkaŭaĵo.

Eble li vizitis ankaŭ un-du vinberejojn kaj gustumis iom da bongusta vino.

Chris Holliss 17/10/15

## "Iloj por Esperantistoj"

Kara Roger. En la Novaĵletero 240 vi mencias kelkajn "Iloj por Esperantistoj"-n.

La scio pri la Esperanto-gramatiko estas unu el la plej gravaj "iloj" por esperantistoj. (Mi supozas, ke Marcel Leereveld samopinias. ☺)

Pro tio mi permesas al mi atentigi pri mia malgranda Esperanto-gramatiko, kiu haveblas en angla, germana kaj dana versio.

(Vidu <http://esperantocxemizo.saluton.dk/esperanto-gramatiko> .)

Komentojn pri la lingvaj eldonoj oni trovos sur la indikita hejmpaĝo. Jes, mi varbas por mia produkto. La prezo de ĝi montros al vi, ke mi varbas por senprofita agado.

Klubo pri pensu mendi 10 ekzemplerojn por ricevi rabaton kaj malaltigi la popecajn sendokostojn

Kun danko pro via bona laboro por Esperanto mi salutas amike,  
Peter Weide



## JEN IO NEDEBATEBLA.

Oni ne povas ĉiam fidi etnajn lingvojn. Ekzemple en la angla estas esprimo "That is debatable", kiu signifas, ke tio estas necerta, ĉar oni povas debati pri tio. Sed en Aŭstralio oni komencis uzi la esprimon en la kontraŭa signifo, nome "Tio estas certa". Tradukante nuntempe tiun esprimon en Esperanton, oni unue devas en ĉiu aparta kazo eltrovi, ĉu



la aŭstrallingva signifo de "debatable" estas AŬ "certa" AŬ "necerta". Granda diferenco! Estas konsilinda, ne uzi en Esperanto la vorton "debatebla", sed la veran signifon "necerta" aŭ, aŭstralie, "certa". La angla uzo estas plej ofte adverba, "debatably", kio do estas "necerte" aŭ "certe", ekz. "He is debatably the strongest player", "Li estas (malĝuste) certe aŭ (ĝuste) malcerte la plej forta ludanto".

Simila eraro kaj misuzo estas la vorto "unisex barber", kiu signifas "hartondisto unuseksa, por nur unu sekso". Mi ĉiam demandas "por kiu sekso?". Ĝi devas esti "ambisex", "(ambaŭseksa)", kiel en "ambidexter".

Plia nefidindaĵo en la angla lingvo estas "brainwashing", kio signifas "purigi la menson", dum la signifo donita al ĝi estas la kontraŭo, "malpurigi la menson, per sugestado". En Esperanto ni devas esti logikaj, kaj do uzi "menspolucio".

Marcel Leereveld.



## La Adelajda Esperanto-klubo.

Jen foto kaj kelkaj vortoj pri nia hieraŭa (24/10/15) kantposttagmezo.



Lastan sabaton- laŭ malnova tradicio - kelkaj Adelaidaj esperantistoj kunvenis ĉe Indrani, babilis, manĝis kaj ..... jes ..... kantis.

Kompreneble mankis Katja kaj Trevor, kiu havis alian "kontrolitan" korhaltigon kaj reeligon. Amike Sandor Horvath

## Dekmilionoj da loĝantoj en unu urbo? Ne problemas!

Dekmilionoj da aŭtoj kreus grandajn problemojn, Ekzistas regulo ke la lasta numero de la aŭtoj devas akordi kun la dato por uzi la urbajn pontojn. Sed la nombro da aŭtoj kreskas.

La solvo estas trajna sistemo tiel bona ke homoj ne bezonas aŭtojn en la urbo.

Jam funkcias 4 linioj. La urbo volas ke 12 linioj funkcios en 2017. Materialoj, homoj,

mono, ne estas problemoj. Se apartamentoj ĝenas la projekton, ili estas detruitaj. Ĉie homoj laboras. Malfacilaĵoj de aliuloj estas ignorata. La proĝreso gravas. La subtera linio no 4 havas 6-vagonajn trajnon, kun 100 km./h de maksimuma rapido, sed kutime 80 km./h de maksimuma rapido, kaj 36.6 km./h averaĝa rapido por vojaĝo inkluzive de la haltejoj Plena trajno provizas 176 seĝojn kaj povas porti 1276 pasaĝerojn laŭ ĉina regulo de 9 homoj por unu kvadrata metro. Ili alvenas ĉiujn 2-minutojn.



**Se vi ne informas min, AE ne povas informi niajn 315 ricevantojn.**

Sendu novaĵon eĉ mallongan, bildojn, fotojn al mi eĉ dum mia foresto en Ĉinujo



## 3ZZZ Retradio

(ĝi ne estas retradio, sed ĝi estas enretigita)

Ĉisemajne, (la 26a de oktobro,) la elsendo en la radio 3ZZZ proponas al vi krom artikoloj pri diversaj temoj intervjuon de José Maria Salguero pri la nova hispana politika partio Podemos.

Nun la radiostacio gardas la elsendojn pli longe en sia retejo [www.3ZZZ.com.au](http://www.3ZZZ.com.au). Krome eblas aŭskulti el la arkivoj de la Melburna Esperanto Societo [www.esperanto.com.au](http://www.esperanto.com.au)

Dezirante al vi agrablan auskultadon,

Franciska Toubale

### La Klubaj Kontribuantoj al la Novajletero

Aŭstraliaj Esperanto-Klubo	211	212	213	214	215	216	217	218	219	220	221	222	223	224	225	226	227	228	229	230	231	232	233	234	235	236	237	238	239	240	
AEA informas																															
Aliaj Landaj kontribuantoj																															
Brisbana Esperanto-Kafo-Klubo																															
Brisbana Esperanto-Societo																															
Centra-Marborda Esperanto-Klubo																															
Kanbero Esperanto -Kafo-Klubo																															
Manlia Esperanto-Klubo																															
Melburna "Meetup" Grupo																															
Melburna Esperanto-Asocio																															
N.S.K Esperanto-Federacio																															
Noumea Klubo (NovKaledonio)																															
Okcident-Aŭstralio Esperanto-Ligo																															
Sudaŭstralio																															
Tasmania Esperanta Societo																															
Toowoomba Esperanto-Societo																															
Torkia Esperanto-Kafo-Klubo																															
Viktorio Esperanto-Federacio																															
3ZZZ Esperanto-programo																															

"Informu AE, se estas eraro en la listo" [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

Eĉ mallonga raporto kaj foto informas ke via klubo ekzistas

30 29 28 27 26 25 24 23 22 21 20 19 18 17 16 15 14 13 12 11 10 9 8 7 6 5 4 3 2 1

